



OProf.Dr.habil.H.Frank, Kleinenberger Weg 16a, D-33100 Paderborn

**JARFINA CIRKULERO 2005**

al ĉiuj membroj de la  
Internacia Scienca Kolegio (ISK),  
Internacia Teknika Kolegio (ITK),  
Internacia Arta Kolegio (IAK)  
kaj al la Subtenaj Membroj de nia Akademio

OProf. Dr.habil. Helmar G. Frank

Prezidanto  
Kleinenberger Weg 16a  
D-33100 Paderborn  
Tel.: (+49-/0-) 5251-163511 / -64200  
Fakso: (+49-/0-) 5251-163533  
Retpoŝto: hfr@uni-paderborn.de  
<http://www.paderborner-impulse.de>  
Paderborn, 2005-12-20

Estimataj kaj karaj samakademianoj!

Ĉijare pro tri kialoj pli facilas bon-tempe skribi mian jarŝanĝan cirkuleron. Unue vi ricevis la pasintjaran maljam antaŭ duona jaro kune kun aktualigo. Due kunsendas informriĉan cirkuleron nia Senata Sekretario. Tria jam certas, ke nia Trezoristo, kiu flugante de Kubo al Usono nur tri tagojn restos en Berlin, tie ne sukcesos jam prepari la financajn raportojn - inkluzive tiujn pri viaj servobonhavostatoj. Li raportos dum niaj asembleoj kaj kunsidoj 2006-03-03-15h / -06-12h en Freising-Weihen-stephan (ĉe München), Am Hochanger 13. Bv. akcepti, ke mi per ĉi tiu cirkulero oficiale tien invitas - kun la kutima tagordo plus du punktoj: „*Decidoj pri regularŝanĝoj*“ kaj „*Estonteco de AIS post 2007*“ -

- (1) la Senaton: je vendredo, 15 h
- (2) la SubS-sembleon: je sabato 16 h
- (3) la Ĝeneralan Asembleon je 17 h
- (4) la membrarsembleon 2005 kaj 2006 de AIS Deutschland je 20h.

Kune pritrakteblaj tagordaj punktoj estos laŭbezone kune pritraktataj dimanĉe kaj eventuale lundmatene.

Sub la gvidado de vicprezidanto Minnaja la decidoj pri regularŝanĝoj estos preparataj per reta diskuto, en kiu ĉiuj AISanoj rajtas partopreni dum la monatoj januaro kaj februaro. Retu per <minnaja@math.unipd.it>, pri kiuj regularoj vi emas kundiskuti. Findeciditaj estas nur nia Konstitucio kaj la Honor-

Verehrte, liebe Mitglieder unserer Akademie!

Aus drei Gründen fällt in diesem Jahr das rechtzeitige Schreiben meines Rundbriefs zum Jahreswechsel leichter: (1) Sie erhielten den letzten erst vor einem halben Jahr - und aktualisiert! (2) Unser Senatssekretär legt einen inhaltsreichen Rundbrief bei. (3) Es steht schon fest, dass unser Schatzmeister, der seinen Flug von Kuba in die USA nur drei Tage in Berlin unterbricht, dabei nicht schon die Finanzberichte fertig stellen kann – auch nicht jene über die Stände Ihrer Dienstleistungskonten. Er berichtet während unserer Versammlungen und Sitzungen 2006-03-03-15h / -06-12h in Freising-Weihenstephan (bei München), Am Hochanger 13. Gestatten Sie, mit diesem Rundbrief offiziell – mit der üblichen Tagesordnung plus zwei Punkten: „*Entscheidungen über Änderungen der Ordnungen*“ und „*Zukunft der AIS nach 2007*“- folgende Einladungen dorthin auszusprechen:

- (1) den Senat auf Freitag, 15 h,
- (2) den Fördersektor auf Samstag, 16 h
- (3) die Generalversammlung auf 17h
- (4) die Mitgliederversammlung 2005 und 2006 der AIS Deutschland auf 20h.

Gemeinsam behandelbare Tagesordnungspunkte werden bei Bedarf gemeinsam am Sonntag und eventuell am Montagmorgen behandelt.

Unter Leitung von Vizepräsident Minnaja werden die Entscheidungen über Änderungen der Ordnungen durch eine Diskussion im Netz vorbereitet, woran jeder AIS-Angehörige im Januar und Februar teilnehmen kann. Netzen Sie über <minnaja@math.unipd.it>, über welche Ordnungen Sie mitdiskutieren möchten. Beschlossen sind erst unsere Verfassung und die Ehrenord-

regularo. Ĉiuj ĝisnunaj regularoj estas rete atingeblaj.

Por la jaroj 2008 – 2011 ni elektos 2007-09-03 en San Marino la novan senaton el kune 11 deĵorantaj aŭ vic-senatanoj (kiuj gvidos la unuopaj senatajn oficojn), la po 6 dekanoj kaj vicdekanoj, la 2 revizorojn, la 5 – 7 estraranojn de la Subtena Sektoro kaj la direktorojn de la Arta kaj Teknika-Praktika (Sciencaplia) Sektoroj. Pripensu la rolojn, kiujn vi pretus laŭbezzone transpreni, kaj faru en Freising-Weihen-stephan sugestojn dum la interkonsiliĝo pri la estonteco de nia Akademio!

SUS 29 okazos de la 26a de aŭgusto ĝis la 3a de septembro en niaj akademi-domoj ĉe la Eŭropa Placo en Komárno. Kursproponojn kaj kandidatiĝojn akceptas nia klerig- kaj ekzamenofico ĝis la 3a de marto en Weihenstephan. Retu samtempe al la jenaj du adresoj: [quednau@lrz.tu-muenchen.de](mailto:quednau@lrz.tu-muenchen.de) kaj [pola-kova@in.slovanet.sk](mailto:pola-kova@in.slovanet.sk), Al SUS 29 senpere antaŭiros en Komarno la 8a TAKIS-konferenco, kaj sekvos en la universitato de la proksima Nitra, organizita de ties UNESKO-katedro, memorsimpozio al nia kunfondinta plenrajta membro Miloš Lánský, mortinta 2005-05-13. Estas proponite, nomi ĉiujn tri kunvenojn kune „*Lánský-kongreso*“. Ni petas pri prelegproponoj. Prelegontoj, kiuj intencas rilatigi sian kontribuon al la scienca aŭ sciencorganiza vivverko de Miloš Lánský, ricevos senpagan ekzempleron de lia kolektita verkaro.

Du finaj petoj. Sciigu la al vi eble konatajn novajn adresojn de la provizore perditaj AISanoj surlistigitaj dorsflanke de la cirkulero de nia Senata Sekretario. Kaj: Uzu la venantajn trankvilajn tagojn por äiri vian AIS-kotizon – prefere nur unufoje por via tuta vivo!

Deziras belajn julon kaj kristnaskon kaj bonan starton en la jaron 2006 via

nung. Alle bisherigen Ordnungen sind über das Internetz einsehbar.

Für die Jahre 2008 – 2011 wählen wir in San Marino 2007-09-03 den neuen Senat mit insgesamt 11 amtierenden und stellvertretenden Senatoren (sie werden die einzelnen Senatsämter leiten), die je 6 Dekane und Vizedekane, die 2 Aufsichtsratsmitglieder, die 5-7 Vorstandsmitglieder des Fördersektors und die Direktoren der Sektoren Kunst und Technik (Wissenschaftsanwendung). Überlegen Sie sich die Rollen, die Sie bei Bedarf zu übernehmen bereit wären, und geben Sie in Freising-Weihenstephan Anregungen während der Beratung über die Zukunft unserer Akademie!

SUS 29 findet vom 26. August bis zum 3. September in unseren Akademiehäusern am Europaplatz in Komárno statt. Kursangebote und Kandidaturen nimmt unser Bildungs- und Prüfungsamt bis zum 3. März in Weihenstephan entgegen. Netzen Sie gleichzeitig an folgende zwei Anschriften: [quednau@lrz.tu-muenchen.de](mailto:quednau@lrz.tu-muenchen.de) und [polakova@in.slovanet.sk](mailto:polakova@in.slovanet.sk), Unmittelbar vor SUS 29 findet in Komárno die 8.TAKIS-Konferenz statt. In der Universität des nahen Nitra folgt, organisiert von ihrem UNESCO-Lehrstuhl, auf SUS 29 eine Gedenksymposion an Miloš Lánský, Mitgründer und Vollmitglied der AIS, der 2005-05-13 verstarb. Es wurde vorgeschlagen, alle drei Veranstaltungen zusammen „*Lánský-Kongress*“ zu nennen. Wir bitten um Vortragsangebote. Vortragende, die beabsichtigen, ihren Beitrag mit dem wissenschaftlichen oder wissenschaftsorganisatorischen Lebenswerk von Miloš Lánský in Verbindung zu bringen, erhalten kostenlos ein Exemplar seiner gesammelten Werke.

Ich schließe mit zwei Bitten. Melden Sie die Ihnen vielleicht bekannten neuen Anschriften der vorübergehend verschollenen AIS-Angehörigen auf der Rückseite des Rundbriefs unseres Senatssekretärs. Und: Benützen Sie die bevorstehenden stillen Tage zur Überweisung Ihres AIS-Beitrags – möglichst nur einmal für Ihr ganzes Leben!

Es wünscht eine schöne Weihnachtszeit und einen guten Beginn des Jahres 2006 Ihr